



Tutmonda Biblioteko je la
memoro de L. Tolstoj.

..... № 13

□ □ LEGENDO □ □
□ □ LEGENDO □ □

PRI FIERA AGEO.

RAKONTO DE
VSEVOLOD GARŜIN.

*Tradukis el la rusa lingvo
N. Kabanov.*

La traduko estas korektita de la anoj de Esper. Literat.
Asocio: S-ro W. H. Garbutt (Anglujo), S-ino H. Halle (Fin-
lando), S-ro Tagulo (Anglujo), S-ro J. Ziermans (Holando).

ELDONO № 1115 DE LA FIRMO
„POSREDNIK“ (PERANTO).

СКАЗАНИЕ О ГОРДОМЪ АГЕЪ. Всеволода Гаршина.
ВЪ ПЕРЕВОДЪ НА ЭСПЕРАНТО.

Издание „ПОСРЕДНИКА“.

Moskvo. 1916.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

POR KIO ESTAS ELDONATA „TUTMONDA BIBLIOTEKO JE
LA MEMORO DE L. TOLSTOJ“.

„Unu animo en ĉiuj“,—vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

Nia eldona firmo „Posrednik“ (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, nia eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en lingvo Esperanto.

Plej alta, plej ĝojiga unuiĝo de homoj estas unuiĝo en komunaj sentoj de frateco, de amo, de heroa kaj modesta ĉiutaga sindonemo, de kompatemo rilate al ĉiuj vivaj estaĵoj, de frata kunhelpado kaj kunlaborado de homoj por komuna bono. Pro tio libroj de esperanta fako de nia eldona firmo estos celantaj ĉefe disvastigadon de tiuj ĉi sentoj, de tiuj ĉi ideoj.

Serio de niaj esperantaj eldonaĵoj estas nomata „Tutmonda Biblioteko“ kaj estas dediĉita al la memoro de nia amiko Lev Nikolàeviĉ Tolstoj, granda predikanto de la unuiĝo de ĉiuj vivoj en mondo.

Komencante tiun ĉi aferon, ni forte esperas subtenadon de ĉiuj, kunsentantaj al la afero. Tiu ĉi subtenado povas esprimiĝi en komunikadoj al ni de verkoj kaj de artikoloj, presitaj en iaj ajn lingvoj kaj plej konformantaj al la fundamentaj ideoj de „Tutmonda Biblioteko“, kaj en helpado de kiel eble plej vasta disvastigado de libretoj de „Tutmonda Biblioteko“ en ĉiuj landoj, kie estas uzata la lingvo Esperanto.

Amikoj en ĉiuj landoj! akceptu saluton de nia frata amo. Ni laboru amike kune por komuna sankta al ni celo.

Ĉefa redaktoro-eldonanto de firmo „Posrednik“

I. Gorbunov-Posadov.

Moskvo, Arbat, 36.

Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 13.


LEGENDO PRI FIERA AGEO.

RAKONTO DE

Vsevolod Garŝin.

*Tradukis el la rusa lingvo
N. Kabanov.*

La traduko estas korektita de la anoj de Esper. Literat. Asocio: S-ro W. H. Garbutt (Anglujo), S-ino H. Halle (Finlando), S-ro Tagulo (Anglujo), S-ro J. Ziermans (Holando).



ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1115.

Moskvo, 1915.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.



Типо-литография Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и К^о. Пименовская ул., соб. д.
МОСКВА—1915.

LEGENDO PRI FIERA AGEO.

Rakonto de V. Garŝin.

Iu reganto vivis en iu lando; lia nomo estis Ageo. Li estis famekonata kaj potenca: la regnestro donis al li plenan potencon super la lando, la malamikoj timis lin, kaj la popolo vivis en la tuta regiono senribele, sciante la potencon de sia reganto. Kaj la reganto fieriĝis kaj komencis opinii, ke neniuj estas en la tuta mondo pli potenca kaj pli saĝa ol li. Li vivis lukse: li havis multon da riĉaĵoj kaj da servantoj, kun kiuj li neniam parolis: li opiniis ilin neindaj de tio ĉi. Li vivis kun sia edzino en konsento, sed li estis severa rilate al ŝi tiel, ke ŝi ne kuraĝis ekparoladi, sed ĉiam atendis, ke la edzo demandus sin pri io aŭ diros ion al ŝi.

Tiel Ageo vivis sola, kvazaŭ staranta sur alta turo. De malsupre amasoj da popolo rigardas lin, kaj li volas atenti neniun, starante sur sia mallarĝa plataĵo kaj opiniante, ke nur tiu ĉi loko estas inda al li: kvankam sole, tamen alte.

Iun festotagon Ageo ekiris la preĝejon. Li venis tien kun sia edzino en luksaj vestoj, iliaj manteloj estis

orteksitaj, la zonoj estis ornamitaj per multekostaj juveloj, kaj super la regantoj oni portis orŝtofan baldakenon. Antaŭ ili kaj post ili militistoj iris kun glavoj kaj hakiloj kaj akompanis ilin ĝis la reĝa loko, kie ili aŭskultos diservon. Estroj kaj oficistoj stariĝis ĉirkaŭ ili. Kaj Ageo aŭskultis diservon kaj meditis, ĉu vere aŭ ne vere estas skribite en sanktaj skribaĵoj.

La ĉefpastro komencis legi kaj ĝislegis tiun lokon, kie estas skribite: „riĉuloj malriĉiĝos, kaj malriĉuloj riĉiĝos“. Ageo ekaŭdis tiajn vortojn kaj ekkoleris.

— Pro kio vi, pastro,—li diras,—legas tian malveraĵon? Ĉu vi ne scias, kiel famekonata kaj riĉa mi estas? Kiel mi malriĉiĝos kaj kiel malriĉulo riĉiĝos kompare kun mi.

La ĉefpastro ne aŭskultis lin kaj komencis legi la libron pluen, kaj finis la diservon, ne respondinte al Ageo.

La reganto ekkoleregis: li ordonis enkatenigi la ĉefpastron kaj meti lin en malliberejon, kaj elŝiri el la libro la paĝon, sur kiu tiuj vortoj estis skribitaj.

Oni forkondukis la ĉefpastron en alliberejon kaj elŝiris la paĝon, kaj la reganto Ageo ekiris siajn ĉambregojn por festeni kaj li trinkis, manĝis kaj gajis.

Iu junulo iris ekster la urbo kaj ekvidis tian altkreskan kaj belan cervon, kian li ne vidis ĝis nun. Kaj li volis komplezi al la reganto: li ekkuris la urbon, venis lian palacon kaj diris al la servantoj pri la cervo. Oni komunikis pri tio al Ageo, kaj li ordonis prepariĝi por ĉasado.

Oni alveturis la kampon por la ĉasado; oni ekvidis la cervon kaj ekgalopis al ĝi. La cervo staras, levinte la ka-

pon, ekrigardadas la ĉasistaron, kvazaŭ atendas ion. Ageo mem neniam vidis tian beston: altkreska, kun glata felo; la vizaĝego delikata, saĝa; la kornoj kiel multebranĉa arbo; inter la finoj de la kornoj estas du metroj. Ĝia felo estas ruĝobruna, brilas kvazaŭ vaksita; la femuroj estas blankaj kiel neĝo. Ageo galopas al ĝi kaj miras, ke la cervo ne forkuras, sed ĉiam rigardas lin per siaj grandaj okuloj kvazaŭ ĝi volas ion diri. Ageo algalopis kaj estis jam preta ĵeti lancon; la besto sin turnis, eksvingis siajn multebranĉajn kornojn, saltis kvin metrojn per unu fojo kaj ekkuris sur la kampo; la ĉevalo sub Ageo estis de netaksebla prezo, tamen ĝi komencis postresti. La reganto sin turnis al siaj ĉasistoj, kaj ili estas jam preskaŭ ne videblaj; li ekrigardas antaŭen la cervon kaj vidas, ke la besto ekkuris pli malrapide. „Nu,—li pensas,—mi atingos ĝin!“ Li galopas je tuta ĉevala povo kaj vidas, ke la cervo fariĝas ĉiam pli proksima al li. Jam li intencis ĵeti la lancon,—la cervo turnis la kapon, ekkuris pli rapide, kaj denove Ageo estas malproksima de ĝi. La ĉasistaro jam de longe estas nevidata, kaj nur Ageo sur ĉevalo kaj la cervo galopas sur la kampo.

Li persekutis ĝin ĝis la tagmezo; fine li vidas, ke la cervo kuras al rivero. „Nu,—li pensas,—se ĝi ekiros dekstren, ĝi forkuros, se—maldekstren, ĝi estas mia!“ Maldekstre la rivero formis kurbiĝon kaj de tie la besto ne povis foriri: malantaŭe estas la ĉasisto, antaŭe—la larĝa rivero, kiun nek homo, nek besto povas transnaĝi. La cervo sin turnis maldekstren; la koro ĉe Ageo

ektremis pro ĝojo. Li galopas kaj pensas: „Baldaŭ vi atingos la riveron, nenien vi povas forkuril!“ La cervo alkuris al la bordo, kaj nemalproksime de la bordo troviĝas malgranda insuleto, kaj sur la insuleto estas densaj arbetoj kaj malaltkreska arbaro. La cervo eksaltis en la akvon per sia tuta forto, subakviĝis, poste elakviĝis kaj eknaĝis al la insulo. Ageo algalopis kaj vidas, ke la besto foriris en arbetojn. Li igis ankaŭ la ĉevalon en la akvon.

La ĉevalo eniĝis en la akvon, faris tri paŝojn kaj enakviĝis ĝis la kolo, kaj plue la piedoj ne atingas la fundon. Ageo returnis ĉevalon al la bordo kaj pensas: „La cervo ne foriros de mi, sed en tia rapida fluo de la rivero mi povas dronigi la ĉevalon“. Li malsupreniĝis de la ĉevalo, alligis ĝin al arbeto, demetis de si la multekostan vestaĵon kaj ekiris en la akvon. Li naĝis, naĝis, la fluo preskaŭ forportis lin. Fine, li provis per la piedo, — estas fundo. „Nu, — li pensas, — mi tuj atingos ĝin“. Kaj li ekiris en arbetojn.

Dio ekkoleris kontraŭ Ageo. Li alvokis anĝelon kaj ordonis al li, ke li, preninte sur sin la korpan eksteriĝon de Ageo, sin vestu en liaj vestoj, supreniĝu sur la ĉevalon kaj rajdu urbon. Kaj la anĝelo plenumis Dian volon laŭ lia vorto.

Ageo serĉis, serĉis la beston en la arbetoj, — la besto ne troviĝas. Li ĉirkaŭiris la tutan insulon; li traserĉis ĉiujn arbetojn, — nenion li trovas. Ageo ne povas eĉ imagi, kien la cervo malaperis: antaŭe estas la larĝa rivero, nenia besto povas transnaĝi ĝin; kaj li ekvidus la cervon, se

ĝi eknaĝus. Ageo ekĉagreniĝis; tamen, kion fari, necese estas reiri. Li aliris al la akvo, forlasis la lancon, ke ĝi ne malhelpu, kaj alnaĝis al la bordo. Li rigardas — nek la ĉevalo, nek la vestoj estas. La reganto ekkoleris, opiniis, ke oni ŝtelis ilin, kaj decidis severe puni la ŝteliston. Li eliris el akvo, supreniris la krutan bordon, — estas senarba kampo, kaj neniue estas videbla. Kion fari, li devas iri nuda. Li iras, kaj la herbo pikas al li la piedojn; li ne estas alkutimiĝinta iri nudpiede; la suno bruligas la nudan korpon kaj la kapon. Ageo iris, iris, supreniĝis sur monteton; li vidas, ke paŝtisto paŝtas bovinon kaj bovidon en la valeto. Ageo haltis kaj komencis signi al li per la mano.

— He vi, — li diras, — venu ĉi tien.

La paŝtisto rigardas lin, miras. „Kiel, — li pensas, — meze de senarba kampo nuda homo montriĝis?“ Li ekiris al li malrapide; en unu mano li havas longan vipon, en alia — trumpeton el betula ŝelo; li mem estas en bastaj ŝuoj kaj en disŝirita kaftano; sako por pano pendas sur lia ŝultro.

Ageo ekkriis al li:

— Pro kio vi ne venas, kiam oni vokas vin?

— Kaj kiu vi estas? — demandas la paŝtisto. — Kion vi bezonas?

— Ĉu vi ne vidis, kiu prenis miajn vestojn kaj forkondukis la ĉevalon?

— Kaj kiu vi mem estas? — denove demandas la paŝtisto.

— Kiel, vi ne konas min? Mi estas via reganto, Ageo. La paŝtisto rigardis iom lin kaj ekridis.

— Kion vi parolas, malsaĝulo! Nia reganto ĵus veturis preter mi en la urbon post la ĉasado. Liaj ĉasistoj longe serĉis lin tie-ĉi kaj trovis lin; ili ekveturis kune.

— Kiel vi kuraĝas, sklavo, sentaŭgulo!—ekkriis Ageo.

— Foriru, foriru!—diras la paŝtisto,—alie vi eksentos mian vipon.

La reganto ne konscias sin pro kolero. Li forgesis, ke li estas nuda kaj senarma, kaj sin ĵetis kontraŭ la paŝtisto. Li ekkaptis lin je la ŝultro, volis bati, sed la paŝtisto estis pli forta: li faligis Ageon teren kaj komencis bati lin per la betula trumpeto. Li batis, batis, ĝis kiam la betula ŝelo tute dispeciĝis kaj lia kolero malaperis.

— Jen,—li diras,—al vi por viaj vortoj. Iru!

Ageo sin levis, tute batita, ekiris malrapide. Kaj la paŝtisto meditis iom kaj ekkompatis lin. „Vane,—li pensas,—mi ofendis tiun homon: eble, li estas ia sensenculo aŭ frenezulo“.

Ageo deiris iom de la paŝtisto kaj aŭdas, ke tiu vokas lin:

— He vi, revenu!

Ageo sin turnis reen kaj vidas, ke la paŝtisto tenas ion en unu mano kaj invitas lin per la alia.

— Revenu!—li krias.—Kien vi ekiros nuda? Prenu almenaŭ la sakon.

Ageo staras, ne movetiĝas. Maldolĉe kaj honte fariĝis al li en la animo. La paŝtisto elmetis tranĉilon el post sia zono, tratranĉis en la sako tri truojn: unu por la kapo, du por la brakoj, kaj aliris al Ageo.

— Mia sako estas malplena, mi manĝis la tutan pannon. Nebone estas al homo iradi nuda, surmetu tiun anstataŭ ĉemizo.

Li surmetis sur lin la sakon. Ageo ekiris la urbon, dirinte nenion. Li iras kaj pensas pri sia malfeliĉo kaj ne scias, de kie ĝi venis al li. Videble, iu trompanto, simila al li, prenis lian vestaĵon kaj forkondukis la ĉevalon. Kaj ju pluen Ageo iras, des pli li ekkoleriĝas. „Mi jen montros al li, ke mi, Ageo, estas vere severega reganto. Mi ordonos alkonduki lin sur placon kaj dehaki lian kapon. Kaj mi punos ankaŭ la paŝtiston“,—Ageo ekpensis kaj subite li rememoris pri la sako kaj ekhontis.

Li iris ĝis la vespero, sed malproksime estas ankoraŭ ĝis la urbo. Li devis pasigi nokton sur la kampo: li enfosiĝis en amason da fojno kaj dormis tie tutan nokton. Li sin levis je mateniĝo kaj denove ekiris; nemalproksime de la urbo li eliris sur grandan vojon. Laŭ tiu vojo multaj homoj iras kaj veturas urban bazaron. Veturilaro atingas lin; veturigistoj komencis demandi lin, kiu li estas kaj pro kio li estas vestita per sako.

Ageo rememoris la batojn de la paŝtisto kaj ektimis diri la veron.

— Mi,—li diras,—ne estas ĉi-tiea loĝanto; mi veturis vian urbon por aferoj, sed sur la vojo rabistoj atakis min, batis kaj rabis min kaj forprenis ĉevalon, vestaĵon kaj monon. Ili vestis sur min la sakon kaj forlasis min.

Bonaj homoj kompatis lin; iu donis ĉemizon, iu—pantolonon; unu donis al li malnovajn botojn, alia—kaftanon,

tria—ĉapon. Ageo dankis ilin, demandis, kiaj estas iliaj nomoj kaj kie estas eble trovi ilin, kaj ekiris la urbon jam pli gaja.

„Baldaŭ,—li pensas,—estos fino al miaj suferoj. Mi punos la malbonulon, kaj tiujn, kiuj helpis min, mi re-kompencos“.

Li ekiris rekte ĉefreĝejan placon: tie estis lia palaco; sed la servantaro ne rekonis lin kaj ne allasis lin. Li timis, ke oni denove komencos bati lin, deiris kaj komencis pensi, kion li faros. „Iri rekte la palacon estas ne-eble: antaŭ ol mi atingos la trompanton, oni batos min, metos en malliberejon kaj eĉ, eble, mortigos min. Necese estas toleri ion“,—li pensas. Li ekiris la bazaron, kie taglaboristoj estis dungataj, kaj aliĝis al ili. Ŝi dungis lin por malmulte da mono por porti brikojn je konstruado. La laboro estis malfacila por li: pro manko de kutimo li sange frotvundis siajn ŝultrojn kaj estas kvazaŭ tute batita. Vespere li ricevis monon kaj dividis ĝin je tri partoj: je unu parto li aĉetis panon kaj manĝis; la duan li restigis provize por la dormoloko, kaj je la tria li aĉetis paperon por skribi leteron al sia edzino. Inter ili estis unu granda sekreto: nur li kaj lia edzino sciis pri ĝi, kaj por ke ŝi kredis lian leteron, li skribis pri tiu ĉi sekreto; alirinte al sia domo li ekvidis iun virinon el la servantinoj de la edzino kaj fordonis al ŝi la leteron, por ke ŝi transdonu ĝin. La servantino ankaŭ ne rekonis lin en la malbona vesto. Ageo stariĝis nemalproksime de la pordego por atendi respondon.

Lia edzino, vidante, ke ŝia edzo estas hejme, ne povis

kredi tiun leteron. Ŝi opiniis, ke ŝia edzo diris okaze al iu pri la sekreto, aŭ ke iu malbonulo volas konsterni ŝin. Ŝi timis sian severan edzon kaj sciis, ke se li sciigos, ke oni alportas al ŝi tiajn leterojn, li punos ŝin ne esplorinte la aferon. Kaj por forpeli tiun homon, kiu skribis leteron, kaj timigi lin, ke li neniam kuraĝu plu konsterni ŝin, ŝi ordonis al la servantoj ekkapti lin, alkonduki sur korton kaj forte lin vergi. La servantoj plenumis tion ĉi kaj forliberigis Ageon preskaŭ nevivan. Li ekiris gastojn kaj suferis la tutan nokton: li dormiĝis nur matene. Doloro estis al lia korpo, sed al lia animo estis ankoraŭ pli malbone: vana, senpova kolerego turmentis lin, kaj ne estas turmentiĝo pli malbona ol ĉi tiu.

Alian tagon estis festo, kaj la gemastroj de la gastejo komencis pretiĝi por iri preĝejon. La mastrino sin vestis feste kaj eliris post la pordegon, kaj la edzo sin detenis por io sur la korto. La edzino komencis voki la edzon:

— Venu,—ŝi krias,—alie la reganto preterpasos en preĝejon kaj ni ne vidos lin.

Ageo ekaŭdis ĉi tion kaj demandas:

— Kiu estas reganto ĉe vi?

— He, vi do ne estas ĉi-tiea, car vi ne konas lin? Ageo estas reganto ĉe ni. Li regas la urbon kaj la tutan regionon jam dekdu jarojn. La reganto estas severega ĉe ni: hieraŭ mi ekvidis lin sur la strato, kaj mi preskaŭ falis pro timo.

La gemastroj ekiris la preĝejon, kaj Ageo ne scias, kion eĉ pensi pri tio. Li eksvingis la manon. „Kio ajn

okazos,—li pensas,—ne estos por mi pli malbone, ol nun; mi ekiros kaj evidentigos trompon de la malbonulo, eĉ se oni ekzekutos min. Kaj li ekiris post la gemastroj al la ĉefpreĝejo kaj starigis kun la popolo en la preĝeja vestiblo, kie la reganto devis pasi.

Kaj Ageo vidas, ke liaj militistoj korpogardantoj iras kun hakiloj kaj kun glavoj, kaj estroj, kaj oficistoj, en festaj vestoj. Kaj la reganto kun la regantedzino iras sub orŝtofa baldakeno; sur ili estas orteksitaj vestoj; iliaj zonoj estas ornamitaj per multekostaj juveloj. Kaj Ageo ekrigardis la vizaĝon de la reganto kaj ektimegis: Dio malfermis al li okulojn, kaj li ekkonis Dian anĝelon. Kaj Ageo, terurigita, forkuris el la urbo.

Li kuris longe, ne sciante, kie kaj kien. Li montriĝis en densega arbaro kaj falis pro laciĝo sub arbo, kaj longe kuŝis senforta kaj senkonscia, kvazaŭ lia animo forlasis lin por ia tempo.

Li rekonsciiĝis nokte, kaj strange fariĝis al li. Li forgesis, kio okazis la lastajn tri tagojn, kaj ne scias, pro kio la steloj rigardas lin el-post la branĉoj, pro kio la arboj bruas per la vento super li, pro kio estas al li malvarme kaj li kuŝas ne sur sia lanuga lito, sed sur malseka herbo. Li komencis rememori kaj rememoris ĉion.

Kaj Ageo ekploris maldolĉe. Li rememoris sian tutan vivon kaj komprenis, ke Dio punis lin ne pro la elŝirita paĝo, sed pro lia tuta vivo. „Mi indignigis Dion,—li pensas,—kaj ĉu estos nun por mi indulgo kaj savó?“

Li kuŝis longe kaj ploris, pentante je siaj pekoj kaj pentante de Dio helpon kaj forton. Kaj Dio donis al li forton.

Mateniĝis. Ageo sin levis kaj eliris el la arbaro kaj ekiris en la helan Dian mondon, al la homoj.

Unu jaro pasis, alia pasas, kaj la edzino de Ageo ĉiam opinias, ke ŝia edzo estas tiu, kiu loĝas kun ŝi en la palaco. Nur ŝi miras, pro kio ŝia edzo fariĝis kvieta kaj bona: li punas kaj ekzekutas neniun, li ne veturas por ĉasado, li nur vizitas preĝejon, esploras malpaciĝojn kaj procesojn kaj interpacigas malpacintajn. Ŝi intervidiĝas kun li malofte; li rigardas ŝin kviete, ne kiel antaŭe, kaj foriras sian ĉambron, fermas la pordon kaj sidas sola.

Fine ŝi demandis lin:

— Mia sinjoro, diru al mi, per kio mi kolerigis vin, ke vi forigis de vi vian edzinon? Mi scias nenian mian kulpon; pro kio vi evitas min jam la duan jaron?

La anĝelo ekrigardis ŝin, ekridetis kaj diris:

— Per nenio vi kolerigis min, kara edzino, sed mi promesis al Dio ne tuŝi vin dum tri jaroj. Jam la tria jaro komenciĝas kaj baldaŭ vi vivos kun via edzo kiel antaŭe.

Li diris, foriris sian ĉambron kaj fermis la pordon. La edzino ekploris kaj ankaŭ ekiris sian ĉambron.

Tiel ili vivis tri jarojn. Unu semajnon antaŭ komenco de kvara jaro la reganto ordonis kunvenigi el la tuta regiono almozulojn kaj mizerulojn. Akcepto kaj regalo estos sur la reganta korto al ĉiuj ili, kaj la reganto donacos al ĉiuj. Kurieroj ekgalopis al ĉiuj urboj; el urboj

oni sendis ordonon al ĉiuj vilaĝoj, kaj almozuloj ekiris de ĉiuj flankoj. Kaj ĝis tiu tempo neniu sciis, ke tiel multaj almozuloj ekzistas en la regiono; ili kovris ĉiujn vojojn: lamuloj, senpieduloj, senbrakuloj, blinduloj, malfortuloj, sensenculoj, maljunaj kaj junaj. Almozuloj malblinduloj iras plejofte po unu, kaj blinduloj—po grupoj. Ili kunvenis la urbon, kaj tiom da ili venis, ke ne nur ili ĉiuj ne povis lokiĝi sur la korto de la reganto, sed ankaŭ ili okupis la tutan ĉefpreĝejan placon.

La reganto ekiris la preĝejon, almozuloj ankaŭ venis preĝejon, nome tiuj, kiuj trovis lokon; aliaj amase staris antaŭ la preĝejo, sur la placo. Tiun tempon servantoj dismetis tablojn sur la placo kaj kovris ilin, kaj metis sur ili kukojn, supojn, viandon, mielon kaj vinon. Kiom ajn estis da almozuloj, ĉiuj trovis lokojn.

La reganto eliris el la preĝejo, haltis en la preĝeja perono, faris signon per la mano, kaj la tuta amaso da popolo silentiĝis.

— Mi estas ĝoja vidi vin ĉiujn, bonaj homoj, mi petas vin manĝi. Sidiĝu kaj manĝu; kaj kiam vi manĝos, mi eliros al vi ankoraŭ unu fojon.

Li diris kaj ekiris sian palacon. Oni komencis sidiĝi apud la tabloj; unu grupo de blinduloj okupis tutan tablon. Tiuj ĉi blinduloj venis de malproksime; ili estis irintaj malrapide kaj longe: ili estis dekdu homoj, sed havis solan kondukanton. Li iris antaŭe, du sin tenis je li, kaj poste la ceteraj popare. Li sidigis ilin kaj mem komencis servi al ili: li verŝis al ili supon en telerojn, disdonis kukojn, distranĉis por ili viandon, kaj donis kulerojn eniliajn manojn.

La blinduloj manĝas, kaj li iradas de unu al alia kaj servas al ili.

Jen en fino de la tagmanĝo la reganto eliris el sia palaco kaj komencis ĉirkaŭiri la tablojn. Iun li demandas pri io, al iu li diras afablan vorton, kaj post li servantoj iras kun mono kaj kun vestoj kaj donacas al ĉiuj. Li ĉirkaŭiris ĉiujn kaj aliras al la lasta tablo, kie la grupo de blinduloj sidas. La kondukanto ekvidis la reganton, ektermis kaj tute paliĝis. La reganto aliras al li kaj demandas:

— Ĉu vi estas ankaŭ almozulo?

— Ne, granda reganto, mi ne estas almozulo. Mi estas servanto de almozuloj.

— Bonon vi diris, homo. Kia estas via nomo?

La kondukanto mallevis la okulojn teren.

— Homoj nomas min Alekseo.

La anĝelo ekrigardis liajn okulojn, ekridetis kaj diras:

— Ne ĉia mensogo opiniĝu mensogo. Sekvu min.

La kondukanto restigis siajn blindulojn kaj ekiris post la reganto en la palacon. Ili iras tra la popolo, kaj ĉiuj miras ilin: ili iras kvazaŭ fratoj. Ambaŭ ili estas altkreskaj, bonstaturaj, ambaŭ—nigroharaj, kaj ambaŭ estas similaj unu al alia per la vizaĝo, nur ĉe la kondukanto multaj grizaj haroj arĝentas je densaj bukloj, kaj la vizaĝo bruniĝis pro la vento kaj pro la suno, kaj la reganto havas blankan kaj helan vizaĝon.

La popolo donis al ili vojon. La anĝelo kondukis la kondukanton en la malproksiman ĉambron kaj fermis la pordon.

— Ĉu vi rekonis min, Ageo?—diras la reganto.—Ĉu vi konas min?

— Mi scias, sinjoro, ke vi estis sendita por puni min. Mi pentas je miaj pekoj, je mia tuta vivo...

Kaj Ageo ekploris kaj ploregis. La anĝelo staras antaŭ li: la vizaĝo de la anĝelo heliĝis, kaj li ridetas; Ageo levis la kapon kaj ĉesis plori: li neniam vidis tian rideton.

— Via puno finiĝis,—diris la anĝelo.—Prenu regantan mantelon, prenu glavon kaj sceptron kaj regantan ĉapon. Memoru, pro kio vi estis punita, kaj regu kviete kaj saĝe, estu de nun frato al via popolo.

— Ne, mia sinjoro, mi malobeos vian ordonon, mi prenos nek glavon, nek sceptron, nek ĉapon, nek mantelon. Mi ne forlasos miajn blindajn fratojn: mi estas por ili lumo, nutraĵo, amiko kaj frato. Tri jarojn mi vivis kun ili, laboris por ili, aliĝis per mia animo al almozuloj kaj mizeruloj. Pardonu vi min kaj forlasu min en la mondon al homoj. Mi longe staris sola inter la popolo, kiel sur ŝtona kolono; alte estis al mi, sed solece, mia koro malmildiĝis, kaj amo al homoj malaperis. Forlasu min!

— Bonon vi diris, Ageo,—respondis la anĝelo.—Iru kun paco!

Kaj la kondukanto Alekseo ekiris kun siaj dekdu blinduloj, kaj laboris la tutan vivon por ili kaj por aliaj senhavuloj, malfortuloj kaj mizeruloj, kaj tiel travivis multajn jarojn ĝis la morto.

Kaj la anĝelo restigis post tri tagoj la korpon de la reganto. Oni enterigis la korpon kaj la popolo bedaŭris pri sia reganto, kiu komence estis fera, sed poste fariĝis kvieta.

Kaj la anĝelo sin prezentis antaŭ Dio.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.

Internacia lingvo.

ВЪ ИЗДАНИИ „ПОСРЕДНИКА“.

- 1) Н. Кабановъ. Вспомогательный международный языкъ эсперанто. Съ письмомъ Л. Н. Толстого объ языкъ эсперанто. Цѣна 12 коп.
- N. Kabanov. Internacia helplingvo Esperanto. Kun letero de L. Tolstoj pri la lingvo Esperanto. Prezo 12 sd.
- 2) Н. Кабановъ. Первая эсперантская книга для чтенія съ грамматикой и словаремъ. Второе изданіе. Цѣна 25 коп.
- N. Kabanov. Unua esperanta legolibro kun gramatiko kaj vortaro. Dua eldono. Prezo 25 sd.
- 3) Н. Кабановъ. Полная грамматика эсперантскаго языка. Съ примѣрами, упражненіями и съ переводомъ упражненій на русскій языкъ. Второе изданіе. Цѣна 45 коп.
- N. Kabanov. Plena gramatiko de la lingvo esperanto. Kun ekzemploj, ekzercoj kaj kun rusa tradiko de la ekzercoj. Dua eldono. Prezo 45 sd.
- 4) Л. Л. Заменгофъ. Основы международного языка Эсперанто. Второе изданіе. Цѣна 35 коп.
- L. L. Zamenhof. La fundamento de la internacia lingvo Esperanto. Dua eldono. Prezo 35 sd.
- 5) Н. Кабановъ. Самый легкій языкъ—Эсперанто. Самоучитель эсперантскаго языка для дѣтей, юношества и для всѣхъ, начинающихъ его изучать. Цѣна 35 коп.
- N. Kabanov. La plej facila lingvo—Esperanto. Memlernolibro de la lingvo Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj por ĉiuj komencantaj lerni ĝin. Prezo 35 sd.
- 6) Н. Кабановъ. Краткій русско-эсперантскій словарь. Цѣна 40 коп.
- N. Kabanov. Rusa-esperanta vortaro. Prezo 40 sd.
- 7) Н. Кабановъ. Полный эсперантско-руссскій словарь. Ц. 70 к.
- N. Kabanov. Plena esperanta-rusa vortaro. Prezo 70 sd.

Продаются въ книжномъ магазинѣ „ПОСРЕДНИКЪ“ (Москва, Петровскія линіи) и въ другихъ книжныхъ магазинахъ. Выписывать можно изъ главн. склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, 36. И. И. ГОРБУНОВУ.

Książnica Podlaska

im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000988358

**ВСЕМИРНАЯ БИБЛИОТЕКА ВЪ ПАМЯТЬ Л. Н. ТОЛСТОГО.
TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ.**

- L. Tolstoj.** Dio unu por ĉiuj (Surata kafejo) (Богъ одинъ у всѣхъ.)
Prezo 5 k. (5 sd.).
- „ Unu animo en ĉiuj (Одна душа во всѣхъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).
- „ Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado. (Первая ступень.)
Prezo 25 k. (25 sd.).
- „ Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros. (Богъ правду видитъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- „ Du maljunuloj. (Два старика.) Prezo 15 k. (15 sd.).
- „ Kie estas amo, tie estas Dio. (Гдѣ любовь, тамъ и Богъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- „ Sieĝo de Sebastopolo. (Осада Севастополя.) Prezo 35 k.
(35 sd.).
- „ Kaŭkaza militkaptito. (Кавказскій плѣнникъ.) Prezo 20 k.
(20 sd.).
- „ Per kio homoj estas vivaj. (Чѣмъ люди живы.) Prezo 15 k.
(15 sd.).
- Naĵivin.** Pri kio la steloj parolas. (О чемъ говорятъ звѣзды.) Prezo 15 k.
(15 sd.).
- Garŝin.** Kvar tagojn sur kampo de batalo. (Четыре дня на полѣ сраженія.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- „ Signalo. (Сигналъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).
- „ Legendo pri fiero Ageo. (Сказаніе о гордомъ Аггеѣ.) Prezo
10 k. (10 sd.).
- Semjonov.** Kortisto (kun autaŭparolo de L. Tolstoj.) (Дворникъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- Lastaj kvin tradukoj estas korektitaj de la anoj de Esper.
Literat. Asocio.**

Estas presataj:

- L. Tolstoj.** KREDU al vi mem. (Вѣрьте себѣ.)
„ AMU unu alian. (Любите другъ друга.)
- L. Tolstoj.** Unua, dua, tria, kvara kaj kvina libretoj por infanoj.
(1, 2, 3, 4 и 5 книжки для дѣтей).
- V. Korolenko.** La infanoj de la subteraĵo (Дѣти подземелья.)
- Aksakov.** Skarlata floreto. (Аленькій цвѣточекъ.)
- Rusaj** popolaj fabeloj. (Русскія народныя сказки.)

Libroj estas vendataj en la librovendejo „Posrednik“ (Moskvo, Petrovskaja linio) kaj en aliaj librovendejoj. Por mendoj sin turnin la ĉefan librotenejon de la eldonoj de „Posrednik“: Moskvo, Arbato, 36, al I. I. Gorbunov.

Выписывать изъ главнаго склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, 36. И. И. ГОРБУНОВУ.

Цѣна 10 коп.—Prezo 10 sd.